Kiel ĉiam, Kalocsay majstras la lingvon, manipulas mirakle la radikojn. Jen kelkaj ekzemploj: *plandi*, *dorsi*, *piedi*, *buſi*, *vorti*, *certi*, *ektago*, *treo*, *sura*, *troo*. Cetere, kial ne (almenaŭ en poezio) uzi tute kompreneblajn formojn *devunte*, *havunte*, *tenatas*?

Pri la neologismoj, estas alia afero. Kelkaj el ili vere utilas: *rimorso*, *klifo*, *pado*, *vertiĝi*, *hego*, k.s. Proponita prepozicio *cis* ŝajnas bona. Sed la pogranda anstataŭigo de vortoj kun *mal-* per *turpa*, *lanta*, *febla*, *rara*, *tarda*, *trista* (ĉu *malgaja* aŭ *malgoja*?)—tio ne riĉigas, nur ŝtonigas la lingvon. Cetere, se Kalocsay bezonas unuokaze vortojn *dura*, *sinistra*, *olda*, kial aliokaze li uzas *malmola*, *maldekstra*, *maljuna* samsignife? Ĉu ne en poezio uzeblus formo *aĝa* anstataŭ *olda*? Ĉu suben ne taŭgus anstataŭ *infren*? Tute senbezone li fabrikas aron da novaj radikoj, mortan balaston—nur por provizi rimojn, aŭ pro simpla kaprico. En la sekvanta listo la novaj estas ne pli netaj, nek pli esprimfortaj, ol la jamaj (en krampoj): *kompano* (*kunulo*), *temerara* (*trokuraĝa*), *merdo* (*feko*), *latrono* (*stelisto*), *forsto* (*spino*? *ego*? *kresto*?), *prizonero* (*karcero*), *separi* (*disigi*), *benigna* (*afabla*), *burso* (*foso*? *sako*? *celo*?), *violenta* (*perfonta*), *tempesto* (*ventego*, *stormo*), *meretrico*=*putino* (*publikulino*), *fango* (*marco*), *poltrona* (*malbrava*), *agresi* (*ataki*), *drudo* (*amato*). Absolute "nocas" la uzo de *eksa=eca* (*alpeska=alpeca*, *fereska=fereca*).

La malbonajn formojn *as* anstataŭ *estas*, kaj *kelk*, *mult*, *bon*, anstataŭ *kelkaj*, *multaj*, *bona* oni ne sufice povas kondamni. *Mult jaroj=jarmulto*; *Kelk jarojn=iarkelkon*. La ritmo de la libro estas tiel nerigora, ke eblas anstataŭigi ĉi tiujn (cetere de Grabowski ekondukitajn) formojn per la plenaj formoj sen perdo. Vidu ekz. paĝon 146, versojn 49, 67. Uzo de *uno* anst. *unu* absolute senmotivas. Kalocsay misuzas prefikson *mis*, kaj donas al ĝi fremdan sencon *ač*. Troviĝas dubaj formoj: *unun* (kial ne *iun*?), *je l'unu flanko*.

Generale la stilo estas multe pli simpla kaj klara, ol ekzemple ĉe *Morto de Smail Aga*; tamen kelkaj frazoj restas al mi enigmaj. Kion signifas: *Serpentoj en Maremma, mi ne kredas, ke estas pli, ol ties sakron kuſis, ĝis kie la ĉeval' al homo cedas*? Ĉu aspektas bele: *Mi kredas, ke li kredas, ke mi kredis . . . ?* Ke neitalo rajtas traduki tian poemegon, kelkaj eble ne konsentos; sed ĉion kontrolis spertaj italoj. Historiaj enkonduko kaj notoj iomete tragvidas la nesciulon.

Finfine—ĉi tiu verko, inda kunulo por *Sinjoro Tadeo* kaj la *Odiseo*, meritas atentan studon de ĉiu interesata pri nunaj lingvotendenco, kaj dignan lokon sur ĉiu moderna Esperanta breto.

REVILO.

La Foiro de Paris.—Okpaĝa reklamilo kun 13 bildoj pri la Foiro de Parizo okazonta 9-24 Majo, 1934. Adreso: 23 Rue Notre-Dame des Victoires, Paris 2.

***Glumarkaj pri la Kongreso en Stockholm.**—20 por 6p. ĉe B.E.A. Afr. 1½p.

The Expression of the ending-point relation in English, French, and German.
Verkita de E. Sapir kaj M. Swadesh; redaktita de A. V. Morris. Eldonita de Linguistic Society of America. 125 pp., 1.50 \$., ĉe I.A.L.A., 425 Lexington Avenue, New York City, U.S.A.

Tre klera kaj pensiga monografo pri la preciza signifo de diversaj esprimoj prepoziciaj aŭ konjunkciaj en la tri lingvoj, kun provo ilin analizi kaj klasi laŭsisteme. Por la lingvisto kaj la tradukisto ĝi havos grandan intereson. La problemoj traktitaj ofte havas rilaton al similaj demandoj en Esperanto.

***Paroladoj de D-ro L. L. Zamenhof.**—
Kompilita de Tasku Sasaki kaj Juntaro Iuasita. Reviziita dua eldono, 141 pp., 15. 3p.

Jen libro nepre havinda de ĉiu, kiu deziras perfektigi sian lingvan stilon. Ĝi enhavas la paroladojn de Zamenhof ĉe la Kongresoj kaj aliloke, laŭ la plej aŭtenta kaj perfekta teksto. Ame kaj kun mirinda zorgo oni atentis la ĝustecon de la teksto laŭ ĉiu detalo, eĉ ĝiskome. En la fino troviĝas funda esploro de ĉiu trovebla varianto, kaj utila pritrakto de la Zamenhofa uzado rilate multajn detalojn.

Ciufoje, kiam oni relegas la Paroladojn, oni konscias ilian majstrecon. Ni ne scias pli bonan legaĵon por daŭriga kurso, aŭ por ĉiu, kiu serĉas bonan modelon.

Kortfattet Oversigt over Worms' System paa Esperanto.—*R. Kreuz kaj A. Worms. Okpaĝa broŝuro represita el "Stenografisk Tidsskrift" (Nov. 1933). Ole Worksgade 7, Horsens, Danujo.*

Resuma adapto por Esperanto de la stenografio Schrey-Worms. Klare presita, sed tro konciza por utili al tiu, kiu ankoraŭ ne scias la sistemon. Kelkaj ekz. haveblaj ĉe la B.E.A. Biblioteko laŭ peto, kun afranko.

Wüster & Co., Wieselburg, Aŭstrujo.—
Katalogo de segiloj. 54 pp., grandformataj, kun detaloj kaj ilustraĵoj pri ĉiuspecaj segiloj kaj segaparatoj. Klarigo en lingvoj Esperanta, angla, franca, itala, hispana. La katalogo enhavas riĉan provizon de fakaj terminoj en Esperanto. Laŭ specimena paĝo kunsendita, oni vidas, ke alia grava aŭstra segilfabrikejo Gebrüder Busatis en Purgstall eldonis sian katalogon laŭ sama modelo. Estas bedaŭrinde, ke anglaj firmoj ne montras similan entreprenemon.

Cosmopolitan Conversation.—Language Problems of International Conferences.
H. N. Shenton, 803 pp. Tole bindita \$7.50. Columbia University Press, 2960 Broadway, New York. Aŭ ĉe S-ro Milford, Bartels Hof, Markt 8, Leipzig, C.1, 37s. 6p.

Kiam homoj diversnaciaj kaj diverslingvaj kunvenas por diskuti aferojn de komuna intereso—kaj da tiaj kongresoj nun okazas tricent ĉiujare—tuj leviĝas la demando, kiumaniere ili interkomprene ĝi. Jen tre riĉe dokumentita kaj plena informaro pri ĉiu fazo de la demando. Oni legas en ĝi ciferojn kaj faktojn pri internaciaj kongresoj: iliaj organizintoj, partoprenintoj, celoj, kaj la rimedoj kiujn ili uzis por interkomprene ĝi, kaj ĝis kiu grado tiuj rimedoj sukcesas; kun multe da detaloj interesaj. La libro estas plej fortapruvo pri la neceso solvi la internacilingvan problemon. Ĝi finiĝas per fortapledo por la generala adopto de iu internacia helplingvo. Studante la libron, oni ne povas ne rimarki la oftecon de aludoj al Esperanto en la praktiko, kaj la plenan neuzatecon de ĉiu alia "internacia lingvo" proponita. Efektive, kun la paso de la tempo, la problemo pli kaj pli nedisputable solvas sin mem per la kreskanta uzo de Esperanto, kvankam tiu uzo ankoraŭ estas en komenca stadio.

Prof. Shenton faris gigantan kaj admirindan laboron, pro kiu ni lin dankas. Por ĉiu interesita pri la demando la libro estas altvaloraj kolekto de faktoj ne troveblaj aliloke, kaj ni kore rekondendas ĝin—aparte al ĉiu grupa bibliotekisto, kaj ĉiu propagandisto por nia Afero.

Socialismo : ĝia ideologio kaj realigo.
D-ro S. Chazan. 47 pp. 0.70 sv. fr., ĉe N. Sapiro, Nowoilpki 8, Warszawa, Polujo.

Traktato penanta konscience kaj objektive skizi la kialon de la movado socialista, priskribi la diversajn konfliktantajn skolojn, kaj trankvile kaj sciente taksi ilian valoron. Mango iom solida, sed nutra. Libro pripensiga kaj havinda.

***Esperanto-Lykill.**—Islanda ŝlosilo. 36 pp. 3p.

Tre bonvena aldonon al la konata ŝlosilaro—la unua Esperanta vortaro en islanda lingvo.

MOVADO FEDERACION

Lancashire and Cheshire.—La 102-a konferenco okazos ĉe Manchester Social Club, Lower Mosley St., Manchester, je 5 Majo, 3.0. Prezidos Prof. W. E. Collinson, M.A., Ph.D., kaj ĉestos la urbestro. Prelegos S-roj W. Roberts, W. Currie, M. C. Butler. Teo 5.30; Vespero teatraĵoj, kantado kaj dancado. Dimanĉe: vagado al Werneth Low.

Northants.—Sek., A. W. Norris, 51 Eastfield Road, Wellingboro. (Nova adreso).

Scottish.—La sespaĝa programo de la kongreso en Leven 19-21 Majo aspektas tre alloga. Vizitontoj al la karbminejo bonvole antaŭsciigu sian intencon al la Sek., S-ro T. J. Mathieson, Manor House, Kirkland, Leven.

West Midland.—Venonta konferenco okazos ĉe Friends Meeting House, Horse Fair, Banbury, je 5 Majo 4.0 ptm. Teo 5.30; poste sociala vespero. Pri intenco ĉesti sciigu F-inon Rake, 5, Broughton Road, Banbury.

MOVADO GRUPA, LOKA

Handeross.—Nova Sek., F-ino E. Coleman, Devon Lodge, Monks Gate, Horsham, Sussex.

London Club (47 Bedford Row, W.C.1).—De la komenco de Majo oni ne plu kunvenos vendrede, sed marde kaj jaude. Programon oni povas ricevi ĉe B.E.A., aŭ ĉe la Sekretario, S-ro E. K. Osmotherly, 1 Crofton Rd., E.13. *Vagadoj*: Majo 13; Surrey Hills. 27, Sevenoaks, Ide Hill, Westerham.

London. Diservo en Esperanto okazos je 3.30, Majo 13an, en la preĝejo St. Ethelburga, 72 Bishopsgate, E.C.2. Parolos: F-ino I. C. Fortey, M.A. La Duadimanĉa Rondo kunvenos poste ĉe Hotela Gt. Eastern.

London, North.—Nova Sek., F-ino R. Davey. Koresponda Sek., S-ino Weston, 27 Cecil Rd., N.10.

Nottingham.—Majo 3, Paroletoj. 17, Vortfarado. 30, Ĉe Dancejo.

Paisley.—Nova Sek., Wm. Carstairs, 5 Underwood Lane. *Vagadoj* (de George Place, 7.30 vespero): Majo 1, Rouken Glen; 8, Gryffe; 15, Gorbal's Water Works; 22, Blythswood; 29, Craigenfeoch.

Wellingboro.—Sek., A. W. Norris, 51 Eastfield Rd. (Nova adreso).

West Hartlepool.—Nova Sek., E. Carr, 15, Byron Street.

Wolverhampton.—Majo 16, Societa kunveno en Beattie's Café.

York.—Nova Sek., E. Lofthouse, 15 Penley's Grove St., York.

MOVADO FAKA

Bontempla.—*The International Good Templar* enhavas paĝon en Esperanto. Red., S-ro T. Honeyman, 61 Peel St., Partick, Glasgow.

Kolektista.—Informojn pri Tutmonda Asocio Kolektanta kaj ĝia gazeto *Tutmonda Kolektanto* volente sendos D-ro Jozefo Takacs, Nagymaros, Hungarujo. Specimena numero kontraŭ respondkupono.

Pacifista.—La gazeto "Elo Fraternal (Pacifista Revuo)" (Rua Luiz Gama 18, Cidade do Salvador, Bahia, Brazil) enhavas multe da artikoloj en kaj pri Esperanto. Oni kunsendas 30 glumarkojn en "angla" lingvo, kiuj bone ekzempligas la erarojn faritajn de inteligenta alilandano, kiuj penas verki angle. Oni disdonadas la gazeton senpage. Esperantlingvaj artikoloj pri paco estas petataj.

Vegetara.—La dumonata gazeto *Vegetarano* nun aperas en nova formato. Gi jam atingis sian 17-an jaron, kaj estas unu el la plej bone redaktataj fakaj gazetoj. Gi propagandas ĉiujn reform-movadojn, kiuj celas al vivo sana, natura, kaj felica. Abono 3s., pere de S-ino M. L. Blaise, 19 Litchfield Avenue, Lower Morden, Surrey; si tamen serĉas anstataŭonton. Oni skribu al si pri tio.

VARIA

Mr. R. R. Tredgold (1 Polworth Rd., S.W.16) offers a prize of the *luksa eldoneo* of *La Biblio* to the person who gains the largest number of new members for the B.E.A. and the Duadimanĉa Rondo by 9 December. He intends to visit the Stockholm Congress by aeroplane, and wishes to form a party. Write him for particulars.

Dr. G. Wilson Burn has retired from the B.E.A. tutorial staff, after many years of efficient and unremitting service. He has been indefatigable in this section of the Association's work, and will be badly missed.

OWING TO AN ADVANTAGEOUS PURCHASE, WE ARE NOW ABLE TO SUPPLY

RUMANA BONHUMORO

By P. FIRU
and

SIGISMUND PRAGANO
at the reduced price of 2/- in paper and 3/- in cloth, postage 2d.



BRITISH ESPERANTO ASSOC.,
142, High Holborn, London, W.C.1.

A SUITABLE GIFT
for Esperantist or non-Esperantist
AT ANY TIME

THE ESPERANTO JIG-SAW PUZZLE

About 150 pieces.

Size $15\frac{3}{4}$ x $11\frac{1}{4}$ in.

Price 2/6, postage 6d.

BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION,
142, HIGH HOLBORN, LONDON, W.C.1.

Every Holiday is in the new series of W.T.A. Programmes

The following literature is available free, and post free.
Send coupon now!

(1A) **Summer Holidays at Home and Abroad**

140 pages . . . an intriguingly interesting programme which you should certainly see before deciding your holiday.

(2) **Land Cruise to Spain**

The Greatest Holiday Value of the year! 2,500 Miles to San Sebastian, Madrid, Barcelona. 15 Days "All-in" £16. 16s.

(3) **Ten Tours to Oberammergau**

An unrivalled selection of tours to Oberammergau and district has been arranged by The W.T.A. at really reasonable prices.

(4) **W.T.A. Sunshine Cruises**

On no Cruise can you have a happier holiday than on these special W.T.A. Cruises. Over 3,000 miles to Sunshine Seas, 5 Sailings, 14 days. Fares from £12 inc.

(5) **Cruises, 1934**

A list of all 1934 Cruises arranged for your guidance. Book through the W.T.A.

(6) **Tours by Special Train**

A perfect holiday . . . the combination of Special Train and W.T.A. "All-in" Holidays. An unrivalled selection of tours by "The William Tell" and "Riviera" Specials to Switzerland, Italy, Riviera, Austria, and Germany.

(7) **Tours to Russia**

A comprehensive programme of tours to the U.S.S.R. Departures every Saturday throughout the Summer.

(8) **Open-air Holidays**

(To be issued shortly.)

The W.T.A. Ltd.

53 Transport House, Smith Sq., S.W.1
(Or any W.T.A. Agent.)

Please send me Programme numbered

NAME

ADDRESS

.

OFFICIAL NOTICES

President : P. L. Wright.
Hon. Secretary : Bernard Long.
Hon Treasurer : Edgar de Knevett.
Secretary : C. C. Goldsmith, F.C.I.
Propaganda Secretary : M. C. Butler, M.R.S.T.

NEW MEMBERS

Booth, H. C.	Teddington.
Bott, C. H.	Kenilworth.
Bridger, Charles	Bexleyheath.
Collier, T. E.	Cambridge.
Comer, C. R.	London, W.12.
Davies, William H.	Cardiff.
Edwards, Margaret L.	London, S.E.27.
Fairbairn, Kenneth	Ryton-on-Tyne.
Franks, Henry B. S.	Hull.
Gummer, Cuthbert F.	Kingston, Ontario.
Gummer, Phyllis M.	Kingston, Ontario.
Hammond, Arthur A.	Newcastle-on-Tyne.
Hayward, Gordon H.	Southend-on-Sea.
Hepton, Albert E.	Hull.
Hill, Raymond H. K.	Malvern.
Holness, Miss E. B.	Hatfield.
Hughes, May	Manchester.
Jeffery, A. R.	Coventry.
Jeffery, Mrs. V. K.	Coventry.
King, Catherine E. B.	Birmingham.
MacMicken, Miss G.	London, N.11.
Mann, Sidney E.	Leatherhead.
Mason, Thomas	Coventry.
Maund, Agnes N.	London, N.16.
Osborne, Miss M. E.	Tonbridge.
Pearson, Herbert	Hamilton, Ontario.
Peters, Barbara G.	London, W.2.
Preston, F.	Leicester.
Riley, Mary	New Barnet.
Schonken, Miss D. B.	Stellenbosch, S. Africa.
Swift, Robert	Bexleyheath.
Verth, Richard J.	Edinburgh.
Virgin, Miss E. A.	London, S.E.8.
Virgin, Rosie L.	Bristol.
Wilkes, Isabel M.	London, N.22.
Yeomans, J. F.	Barrow-in-Furness.
Zeine, Z. N.	Beirut.

GUARANTEE FUND, 1934

	£	s.	d.
Previously acknowledged ..	241	15	0
Elderkin, T., Todmorden ..	1	0	0
Highfield, E. H., London, N.7 ..	10	0	0
Horner, J. C., Calcutta ..	2	0	0
Jones, Miss E. A., Kingston ..	2	0	0
Lister, Miss E. M., Ely ..	5	0	0
Martin, A. L., London, E.17 ..	5	0	0
Soulsby, Mrs. E., Amotherby ..	2	2	0
<hr/>			
	£249	17	0

Additional guarantees will be heartily welcome.
Guarantee forms may be obtained from the office.

EXECUTIVE COMMITTEE MEETING

March 5th. Present : The President, The Hon. Secretary, Miss R. Davey, W. H. Matthews, R. Robertson, F. E. Wadham, and E. W. Willcocks. Many routine matters were considered; Delegates to the National Peace Congress in Birmingham were appointed. It was decided to recommend to the A.G.M. the acceptance of an invitation to hold the British Congress in Southend-on-Sea next year. The possibility of arranging Ce courses in London next Autumn was discussed.

DONATIONS TO B.E.A.

General Funds.—Mrs. E. M. Robertson, £2 ; H. L. Gandell, £1 ; Dowager Countess of Castle Stewart, 12/- ; Lt.-Col. G. S. Robinson, 10/- ; Miss G. H. Moxon, 7/3 ; E. Whitley, 6/- ; R. Robertson, 5/6 ; T. J. Lake, Miss Lawrence, "M.", 5/- ; E. H. Lawton, 2/6 ; F. R. A. McCormick, 2/3 ; S. Marks, 2/- ; W. Everton, W. Jackson, 1/-.

Advertising Fund.—W. M. Appleby, £1 ; H. L. Gandell, 13/- ; Miss H. Boord, 10/6 ; Mr. and Mrs. Crofts, Miss A. Hurley, 10/- ; F. Mercer 9/11 ; Lt.-Col. G. S. Robinson, 8/- ; Miss G. H. Moxon, 7/6 ; A. E. Nobes, 7/- ; E. Whitley, 6/- ; R. Robertson, 5/6 ; J. Bowman, Iu, 5/- ; C. C. Goldsmith, 4/- ; A. M. Macquarie, 2/6 ; Anon, W. Minchin, 1/-.

B.E.A. EXAMINATION SUCCESSES

Advanced (D.B.E.A.) : *Norman N. Forbes, George Bury, James F. Jackson, Liverpool ; *Francis R. Jones, Rock Ferry ; Miss Jean McGregor, Glasgow ; Thomas King, Clydebank.

Preliminary : George F. Greenbury, *William T. Gayter, Cleethorpes ; Clara K. Hansen, Grimsby ; John Lambert, Daniel Scally, *Christina Smith, Paisley ; Annie E. Baxter, Walton ; Amy T. Whalley, Liverpool ; Mrs. Hannah E. Jackson, Wavertree ; Ivy F. Shipman, Birkenhead ; *Catherine B. Campbell, *Maggie A. Garrioch, James Smith, Glasgow ; Alexander McGarva, Dalmuir.

* *Kun honoro.*

CECIL C. GOLDSMITH,
Secretary.

MORTOJ

Birkett.—Je 22 Januaro, ĉe Grange-over-Sands, Joseph James Birkett, Dumviva Fratulo de B.E.A., 59-jara. Li estis sperta kaj entuziasma laboranto por nia lingvo.

Stacy.—Je 15 Marto, ĉe Woodthorpe, Buckhurst Hill, Essex ; William King Stacy, 84-jara, post longa malsano pacience suferata. Li Esperantistiĝis en 1906, kaj estis ĉiama subtenanto de movadoj por internacia amikeco.

Walls.—Je 4 Aprilo, Fino E. M. G. Walls, el 6 Bristol Avenue, Saltburn, 73-jara. Antaŭe en Southport, poste en Saltburn, si ĉiam subtenis nian movadon.

PENSO

Sub la arboj vagis mi,
Malgaja estis mia kor'.
La birdoj kantis nur pri vi,
Sed pli akriĝis la dolor'.

Folioj falis en arbar',
Felico flugis for de mi :
La suno dormis sur la mar'
La ondoj flustris nur pri vi.

"Amo" povas bele soni,
Sed jen, amontoj, la danger'—
La dolĉa sento povas doni
Samtempe ĝojon kun mizer' !
Originala verko de lerneja knabo.

THE ESPERANTO STUDENT

Hon. Redaktoro : W. SEVERN.

PARALLEL TRANSLATION.

How easy is riding, after the first timidity is got over, to supple and youthful limbs; and there is no second fear. The creature soon found that the nerves of his rider were in proper tone. Turning his head half round, he made a kind of whining noise, flung out a little foam, and set off.

In less than two hours I had made the circuit of the Devil's Mountain, and was returning along the road, bathed with perspiration, but screaming with delight; the cob laughing in his equine way, scattering foam and pebbles to the left and right, and trotting at the rate of sixteen miles an hour.

GEORGE BORROW.

Kia facilajo al flekseblaj kaj junecaj membroj estas rajdado, kiam la unua timemo estas venkita; kaj ne ekzistas dua timo. La besto baldaŭ konstatis, ke la nervaro de ĝia rajdanto estas bontona. Duone turnante la kapon, ĝi kvazaŭ krietis, eljetis iom da ŝaŭmo kaj ekiris.

Post malpli ol du horoj mi estis rondirinta la "Diablan Monton," kaj estis revenanta laŭlonge de la vojo, ŝvitkovrite, sed akre kriante pro ravigo; la kobo ridis laŭ la ĉevala maniero, disjetante ŝaŭmon kaj ŝtonetojn, dek-stren-maldekstren, kaj trotante po dekses mejloj en horo.

GEORGE BORROW.

Kelnero : "La kafo ŝajne tre plaĉas al vi, sinjoro."

Kliento : "Jes, jen kial mi jam trinkis sep tasojn da akvo por havigi iom."

"Kion vi festis hieraŭ vespere?"

"Ho, la saman aferon; la dekan datrevenon de la trideka datreveno de la nasko-tago de mia edzino."

"Ciuj Esperantistoj malbone prononcas unu vorton."

"Kiu vorto?"

"Malbone."

"Estas tre agrable kuši en la lito kaj alvoki lakeon per sonorileto."

"Kio? Ĉu vi havas lakeon?"

"Ne, sed mi havas sonorileton."

Competitions for Juniors.

All Entries to be received not later than May 18th, 1934.

COMPETITION No. 8A. (Age limit 15).

(i.) TRANSFORMO. (Roots only).

Change BASEN' into TERAS' by taking away two letters from the beginning, and adding two letters at the end, of each root.

B A S E N
..... S E N A T
..... N A T .. k.t.p.

(Give the English meanings also).

(ii.) VIZITKARTO.

Divenu mian profesion, kunmiksante kaj uzante ĉiujn literojn sur mia vizitkarto.

COMPETITION No. 8B. (Age limit 18).

VERKETO

Tiu homo, kiun mi admiras.
(Not more than 120 words).

SOLUTION.

(Sixth Competition).

Horizontale : Toronto, Marši, Ism, Ial, Aperi, Ombrelo.

Vertikale : Testudo, Oktobro, Milda, Imiti, Ili, Mal.

Book prizes have been awarded to Dorothy Edwards and George Lepts.

Honours List : H. Bradley, R. Carter, C. Curtis, E. Davis, G. Graham, E. M. King, J. Pitts, A. Richards.

Hon. Mention : A. Andrews, A. Hirchfield.

STUART BECK, I.S.O.

SMALL ANNOUNCEMENTS

(1d. per word. Minimum 1/- per issue. Prepaid)

Copy must be received at our offices by the 6th of the month for insertion in the next issue.

Bournemouth. Food Reform Guest House. Loughtonhurst, West Cliff Gardens. For a comfortable holiday or a complete rest. From 49/-. Apply, Manager.

Stamps bought and sold—free price-lists. Postmarkoj—prezlistoj senpage. W. M. Appleby, Clarence Street, Cheltenham, England.

Buy and Read our new four-page leaflet "The Workers' Esperanto Movement." Three copies for a 1d. stamp from S. J. Smith, Sec. British Labour Esperanto Association, 36 Womersley Rd., N.8.

Colwyn Bay.—Public or private apartments or board; vegetarian or otherwise. Briarwood, Princes Drive.

Christchurch.—Comfortable board residence 42/-, bed and breakfast 4/6, or apartments. "Melcombe," Portfield Road.

64-page book about herbs that cure. 2d. Send for one and cure yourself. Trimmells, 144 Richmond Road, Cardiff.

Partoprenu al la 5a Jubilia Flandra Kongreso de Esperanto en Ostendo je Pentekosto (19, 20 kaj 21 Majo, 1934). Petu informojn al la Loka Kongresa Komitato, S-ro M. Troch, 37 Plakkerstraat, Ostendo.

A book to Buy—to read—and to lend to friends! "The Life of Zamenhof"; translated from the original Esperanto of Dr. Privat by Ralph Elliott. Cloth 4/6, postage 4d., from the B.E.A.

BACK TO LIFE

—o—
Most of the following Esperanto books have been presumed to be out-of-print for many years. We have just secured a small stock of each from America. All are interesting, and you are advised to order them while still available.

Akrobato de Nia Sinjoro, La.

E. S. Payson. 9d., post 1d.

Blanche.

S. H. Adams (E. S. Payson). 1/-, post 1d.

Kiel Plaĉas al Vi. Shakespeare

(D-ro Ivy Kellerman) illustrated, 2/-, post 2d.

Lando de Argenta Akvo. V. E. Roe

9d., post 1d.

Miserere kaj Thais. M. Wagnalls

(E. S. Payson). 1/3, post 1d.

Princo Vanc'. Putman & Bates

(Harris). illus. 1/-, post 2d.

Rozujo Ĉiumiljara, La. M. Wagnalls

(E. S. Payson). 1/-, post 1d.

Sep Ridoj.

Lehman Wendell. 9d., post 1d.

—o—
THE BRITISH ESPERANTO ASS., INC.
142 HIGH HOLBORN, LONDON, W.C.1.

THE BRITISH ESPERANTIST

Publishers (Eldonistoj) : THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, 142 HIGH HOLBORN, LONDON, W.C.1. Telephone : HOLBORN 4794.

Editor (Redaktisto) : MONTAGU C. BUTLER, 36 PENRHYN ROAD, KINGSTON-ON-THEMES, SURREY. Telephone : KINGSTON 1484.

RATES OF SUBSCRIPTION (including postage to any part of the world)—Twelve months, 2/6. Single copies, Three Penny Stamps. (Free to B.E.A. members).

ADVERTISEMENT RATES will be quoted on application to the Secretary of the B.E.A.

JARABONO : 3 svisaj frankoj. Unuopaj ekzempleroj : po 30 centimoj (aŭ unu respondkupono). Oni sendu manuskriptojn al la Redaktisto. La Redaktisto resendos nur tiujn manuskriptojn, kiujn akompanas afrankita koverto, aŭ respondkupono. Li rezervas la rajton fari korektojn laŭbezono.

MANUSCRIPTS should be typewritten, and be addressed to THE EDITOR. Although care will be taken to return rejected manuscripts, the Editor does not hold himself responsible for loss or damage, nor does he undertake to return manuscripts unaccompanied by a stamped addressed envelope. He is not necessarily in agreement with views expressed in signed articles, but accepts responsibility for those unsigned.

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION consists of Fellows, Members, Patrons, Affiliated Groups, and Federations.

The Annual Subscriptions are :—Fellows, 21/-; Members, 5/-; Junior Members (under 18), 2/6; Patrons, £1. 1s. od.; Life Fellowship, £12. 12s. od.; Life Membership, £5. (See prospectus).